# Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

| N.ro 4 1969 | ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH | 3-periodo 35-a (40-a) jaro Monata |
|---|---|---|


# La 41-a Norvega Esperanto-Kongreso

## Kunvoko

Per ĉi tio ni kunvokas la 41-an landan kongreson de Norvega Esperantista Ligo en Budor Turisthotelo, Løten, la 21an kaj 22an de Junio 1969. La inaŭguro okazos la 21an je la 12.00, la unua laborkunsido komenciĝos je la 14.00. Tagordo:

1. Malfermo per la prezidanto.
2. Elekto de kunvenaj funkciuloj (protokolantoj, kunvena prezidanto, elekta komisiono, komiono por plenrajtoj kaj voĉnombrado).
3. Jarraportoj 1967 kaj 1968.
4. Jarkalkuloj 1967 kaj 1968.
5. Alvenintaj proponoj.
6. Kiel denove aktivigi la norvegan Esperanto-movadon kaj kreskigi la membronombron?
7. Elekto de Liga Konsilantaro, inkluzive de Estraro, anstataŭantoj kaj revizoroj.
8. Eventualaĵoj.

Jarraporto kaj jarkalkuloj pri 1968 troviĝas aliloke en ĉi tiu numero.

*Pri punktoj 3 kaj 4.* Ĉar ne okazis landa kunveno en 1968, la jarraporto kaj jarkalkuloj pri 1967 ne estas traktitaj kaj aprobitaj de landa kunveno. La raportoj kaj kalkuloj pri 1967 kaj 1968 estas egale redaktitaj. La Estraro proponas legi nur tiujn pri 1968 dum la ĉi-jara kunveno, sed petas la membrojn tralegi antaŭe tiujn pri 1967 en Norvega Esperantisto 5/6-1968, tiel ke oni povu ambaŭ jarojn kune pritrakti.

*Pri punkto 5.* Oni antaŭvidas proponojn pri unu aŭ pluraj rezolucioj.

*Pri punkto 6.* Dum la lastaj jaroj oni konstatis maltrankviligan malviglecon de la movado en nia lando. Okazis tre malmultaj kursoj, la nombro de novaj adeptoj malsuperas la normalan perdon, la membronombro malkreskas, kaj la membraro konsistas ĉefe el relative

malmultaj malnovaj fideluloj. Tiu evuluo devas ne daŭri, ni devas iel haltigi ĝin kaj turni ĝin en revigliĝon kaj kreskadon, alie ni devos grave redukti nian agadon. La landa kunveno en 1967 ekdiskutis la demandon, sed la diskutado iel deflankiĝis kaj ne kondukis al konkludoj kaj koncizaj ideoj. La Liga Estraro tial deziras denove serioze diskuti la situacion kun la membroj kaj la klubaj reprezentantoj.

La Liga Estraro admonas ĉiujn klubojn sendi reprezentantojn al la landa kongreso, kaj esperas ke ankaŭ multaj rektaj membroj ĉeestos.

*La Liga Estraro.*

## La kontorfodaĵo

| | | |
|---|---|---|
| Pli frue | kr. | 199,00 |
| A. Strai | » | 15,00 |
| R. Bugge-Paulsen | » | 30,00 |
| E. Vormdal | » | 30,00 |
| Mara Vento | » | 130,00 |
| N.E.F.A. | » | 100,00 |
| F. Hole | » | 80,00 |
| R. Horrisland | » | 10,00 |
| R. Berli | » | 10,00 |
| Sauda Esperantoklubb | » | 25,00 |
| J. Malmquist | » | 5,00 |
| C.S.B. | » | 20,00 |
| | kr. | 654,00 |

*La Propaganda Fondaĵo.*

Anonimulo ........ kr. 500,00

Koran dankon al ĉiuj donacintoj!

*

## Subtenantaj membroj de N.E.L.

Bjarne Aandahl, Kristiansund N.
Sigrid Hole, Storsjøen
Knut Syversen, Greåker.

## Informoj de la Ekzamena Komisiono

*Ekzameno plenumita.* Pro bedaŭrinda eraro ne pli frue estas raportita jeno: dum 1968 instruistan ekzamenon sukcese plenumis en Oslo John Berggreen.

Ekzamena Komisiono de N.E.L.

*C. Støp-Bowitz*
prezidanto.

HELSINGØR

La internacia feriaj Esp-kursoj de Helsingør okazos 20.-26. de julio 1969 en La internacia Altlernejo (tute modernigita). Venu al Danlando por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe
L. Friis
Ingemannsvej 9
DK-8230 *Åbyhøj,*
Danlando.

NB. Aŭtunaj feriaj Esp.-kursoj okazos en la alternejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 19.-25. de okt. Programo jam havebla ĉe L. Friis.





**Norvega Esperantisto**
ESPERANTOBLADET

*Redakcio:* Johan Hammond Rosbach, Hans Amund Rosbach.

*Adreso de la redakcio:* Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20 en la monato antaŭ la apero.

*Abonprezo:* En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—.

*Anoncprezoj:* 1/1 paĝo kr. 150,—, 1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—, 1/8 p. kr. 19,—.

## Malforta lando

Norvegujo estas unu el la landoj en la dua parto de la internacia konkurso de U.E.A. — inter la malfortaj landoj. Certe la kondiĉoj de tiu konkurso ne precize indikas la staton de la opa lando, ĉar oni povas ricevi plurajn poentojn per alispeca membreco (MA au DM). Tamen la impreso restas malbona. Kaj — kaj tio estas ĉefafero — la rezulto de tiu konkurso jaron post jaro montras, ke la movado en Norvegujo ne nur stagnas, sed malprogresas.

La ĉeftasko de la jarkunveno do devas esti trovi la kaŭzon, kaj trovi la manieron ŝanĝi la malprogreson al progreso. La solvo estas evidenta kaj facile atingebla! Ni atentigis pri ĝi antaŭe. La ĉefvorto de la solvo estas «mi».

Mi devas iĝi io pli ol nura klubmembro. Mi devas praktiki la lingvon. Mi devas ne propagandi la lingvon, sed per propra uzo montri la avantaĝojn. Mi devas starigi la studrondon por tiuj najbar(in)oj, kiuj ja havas intereson. Mi devas kontaktiĝi kun la skolta trupo kaj proponi mian helpon dum preparado al esperanto-insigno. Mi devas aĉeti kaj legi la rekomenditajn librojn. Jes — mi. Vi.

*R.*

# *Norvega Esperantista ligo*

## Jarraporto 1968

ESTRADO

*La Liga Konsilantaro* dum la tuta jaro konsistis el:
Prezidanto: C. Støp-Bowitz
Vicprezidanto: Kjell Gustavsen
Ĝenerala sekretario: John Berggreen
Sekretario: Signe Korstvedt
Kasisto: Karl Ekhaugen
Estraranoj: Olav Rygg, Kirsten Ek
Anstataŭantoj: Harda Danielsen, Alfred Skyberg, Otto Koren.

Ceteraj konsilantaranoj:
Doris Birkelund, Bergen
Trygve Kvalvåg, Stavanger
Herolv Olsen, Tromsø
Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg
Oddmund Rykkvin, Trondhejmo: (observanto).

Revizoroj: John Selbekk, Karin Sandberg.

*Landa kongreso* ne okazis dum 1968.

## ADMINISTRADO

*Estrarkunvenoj.* Okazis 6 estrarkunvenoj (7 en 1967) kaj oni protokolis 76 punktojn (88 en 1967).

*Cirkuleroj.* La Estraro elsendis al la kluboj kaj distriktoj 7 cirkulerojn, i. a. kun invito al mendoj de donac- kaj propagandabonoj al Norvega Esperantisto, kaj unu kun plano de la ĝenerala sekretario pri novaj aktivecoj. Cetere oni publikigis informojn al la membraro en la rubriko «Sciigoj de N.E.L.» en Norvega Esperantisto. Tial nur 3 cirkuleroj estis sendataj ankaŭ al la rektaj membroj.

*Oficejo.* La tenado de la oficejo estas ebla nur per la malavara subtenado flanke de membroj per la oficeja fondaĵo. Pluraj pagas libervolan monatan aŭ jaran kontribuon. La oficejo servas samtempe por la Eldonejo Esperanto A/S kaj por Klubo Esperantista en Oslo, kiuj pagas partojn de la luprezo. La malnovan oficejon oni konservas kiel provizejon. La oficejon estris la prezidanto kunlabore kun la ĝenerala sekretario. Estis regula deĵoro tie dufoje semajne. La laboron dividis inter si la estraranoj. La Ligo, la Eldonejo kaj la Klubo havas komunan telefonon.

*La Oficeja Fondaĵo* dum la jaro donace ricevis kr. 1 210,60 (en 1967 kr. 1 501,15). La Estraro kore dankas al la kontribuintoj.

*La Financa Komisiono,* konsistanta el John Berggreen (prez.), Kirsten Ek, Johan Matland, Alfred Skyberg (membroj), daŭrigis sian laboron. Oni daŭre dissendis petskribojn, sed la neta gajno estis nur kr. 100,00. La laboroj estas daŭrigataj, kaj oni konsideras novajn metodojn.

*Kunlaboro kun N.E.F.A..* Bone funkcias la interkonsento kun Norvega Esperantista Fervojista Asocio, ke ĝi disponu unu paĝon en ĉiu numero de Norvega Esperantisto kiel sian oficialan organon, ĉiuj membroj de N.E.F.A. estu abonantoj de Norvega Esperantisto, kaj la kaso de N.E.F.A. pagu kr. 400,00 kiel kontribuon al la preskostoj.

## DISTRIKTOJ, KLUBOJ KAJ MEMBROJ

*Distriktoj.* Precipe Okcidenta Distrikto bone laboris, Orienta Distrikto pliaktiviĝis, Meza kaj Nordlanda Distriktoj estis malpli aktivaj. — Nord-Norvega Esperanto-Distrikto ne funkcias.

*Kluboj.* Je la jarfino 1967 N.E.L. havis 20 aliĝintajn klubojn. Neniu klubo fondiĝis, sed 1 klubo malaperis. Je la jarfino 1968 N.E.L. sekve havis 19 klubojn.

M e m b r o s t a t i s t i k o :

| | |
|---|---|
| Bergen, La E.-klubo de, Ok.D. | 31 |
| Bodø Esperantoklubb, N. D. | 10 |
| Gjøvik, Klubo Esp. de, Or.D. | 5 |
| Halden, Ascendo, Or.D. .... | 10 |
| Hamar, La Norda Stelo, Or.D. | 16 |
| Harstad, Noktomeza Suno, N.N.E.D. .............. | 7 |
| Haugesund, Mara Vento, Ok.D. ............... | 45 |
| Jørpeland, Pacaj Batalantoj, Ok.D. ............... | 6 |
| Kristiansands E.-klubb .... | 13 |
| Løten, La tri verdaj steloj de, Or.D. ............... | 11 |
| Mo, La E.-klubo de, N.D. .. | 5 |
| Odda, La Glaciaro, Ok.D. .. | 6 |
| Oslo, Klubo Esp. en, Or.D. | 134 |
| Sarpsborg, La Urso, Or.D. .. | 14 |
| Sauda E.-klubb, Ok.D. .... | 19 |
| Skorovatn, Skorovas E.-klubb, M.D. ............ | 5 |
| Skudeneshavn, La Granda Ideo, Ok.D. ............ | 8 |
| Tromsø, La Norda Lumo, N.N.E.D. .............. | 6 |
| Trondhejmo, Grupo Esperantista, M.D. ...... | 34 |
| Sumo: | 385 |
| Individuaj membroj ...... | 134 |
| Entute: | 519 |

La mallongigoj post la nomoj de la kluboj montras la distrikton, al kiu la klubo apartenas.

Specifo de la membraro laŭ kategorioj:

Klubanoj:

| | | |
|---|---|---|
| Ordinaraj ............ | 303 | |
| Junulaj .............. | 12 | |
| Familiaj ............ | 54 | |
| Junaj familiaj ....... | 11 | |
| Honoraj ............ | 2 | |
| Subtenantaj .......... | 1 | 385 |

Individuaj membroj:

| | | |
|---|---|---|
| Rekte aliĝintaj membroj ordinaraj .......... | 112 | |
| Rekte aliĝintaj membroj junulaj ............ | 5 | |
| Rekte aliĝintaj membroj familiaj ............ | 5 | 122 |
| Dumvivaj membroj ........ | | 6 |
| Subtenantaj membroj ...... | | 6 |
| Entute: | | 519 |

Krome pagis 3 kontribuaj membroj. — Entute la membronombro montras perdon de 2,1 % kompare kun la antaŭa jaro.

## KLUBLABORO

*Superrigardo.* (Ĉar nur 14 el la 19 kluboj sendis ĉiujn devigajn raportojn, kelkaj el la subaj ciferoj kredeble estas tro malaltaj.) Suma membronombro je la 1/1 1968: 394. Aliĝoj: 17, eksiĝoj: 26. Membronombro je la 31/12: 385. — Okazis 125 klubkunvenoj, meznombre ĉeestis proks. 58 %; plurfoje estas raportita 100-procenta ĉeesto. — Raportiĝis 29 estrarkunvenoj, 9 festoj, ekskursoj k.t.p.. En 2 kluboj laboris 3 studrondoj kun 17 membroj. 5 kluboj raportas pri biblioteko kun 313 volumoj. 72 klubanoj posedas elementan ekzamenon, 49 superan, 3 instruistan.

Dum 1968 oni eksperimentis per nur duonjaraj raportoj, kio ne montriĝis tre kontentiga, sed la Estraro zorge urĝigis pri mankantaj raportoj. Oni decidis en 1969 reiri al la laŭstatutaj kvaronjaraj raportoj de la kluboj. — La intereso inter la membroj grandparte ŝajnas esti bona.

*Teatra Sekcio,* gvidata de C. Støp-Bowitz, sendis distraĵojn al kluboj, kiuj petis pri tio.

*Aktivigo.* Planon por aktivigo, parte laŭ novaj vojoj, ellaboris la ĝenerala sekretario; la plano estis elsendata al la kluboj kaj rektaj membroj en Aprilo kaj rezultigis kelkajn tre pozitivajn respondojn. La ĝenerala sekretario preparis novan cirkuleran leteron pri la plano por elsendo en Januaro.

STUDLABORO

*Kursgvidantoj.* Neniu eksterlanda kursgvidanto agadis en la lando dum 1968, sed en kelkaj lokoj okazis kursoj gvidataj de lokaj fortoj.

*Kursoj.* Raportiĝis 5 kursoj por komencantoj kun sume 42 kursanoj en Løten, Oslo kaj Tromsø, kaj 3 kursoj por progresantoj kun 16 kursanoj en Bergen kaj Haugesund. Kredeble okazis ankaŭ kelkaj kursoj, pri kiuj raportoj ne estas ricevitaj, aŭ kiuj je la jarfino ankoraŭ ne finiĝis.

*Korespondaj kursoj.* La Sekcio pri Koresponda Instruado estis gvidata de Else-Margrethe Müller, Trondhejmo. Estis bona kunlaboro kun «Folkets Brevskole», kiu uzas la kursojn de N.E.L., sed mem prizorgas administradon kaj anoncadon. N.E.L. havigas instruanton kaj ricevas raportojn pri lernantoj, kiuj plenumas la kursojn ĉe «Folkets Brevskole». Ankaŭ Norvega Blindula Asocio utiligas la kursojn. — Ĉe N.E.L. aliĝis al la unua parto 19 kursanoj, inter ili unu studrondo kun 7 anoj, al la dua parto 14. Oni daŭre liveris la kurson por reduktita tarifo al gejunuloj; 8 lernantoj en la unua parto estas tiaj. Ĉe «Folkets Brevskole» aliĝis al la unua parto 10 kursanoj, al la dua parto 16, inter ili 2 studrondoj kun 9 kaj 2 anoj. — Neniu kursano estas varbita de membroj de N.E.L.. Ĉiuj, kiuj plenumis la unuan parton, ricevis duonjaran abonon al Norvega Esperantisto kaj proponon pri membreco. — Instruis E. Holten kaj L. K. Hunnes, por gejunuloj L. Anjer, por «Folkets Brevskole» L. K. Hunnes, por blinduloj H. Karterud. — La kurso estis 3-foje anoncata en la semajna gazeto «Hjemmet» dum la aŭtuno. — La provizo de la kursleteroj nun rapide proksimiĝas al elĉerpiĝo, kaj L. K. Hunnes daŭrigas reviziadon por nova eldono.

*Gazeta kurso* aperis en 1968 en neniu gazeto.

*Perfektiga studado.* La Ekzamena Komisiono ankaŭ dum 1968 korektadis taskojn por interesiĝantoj. Oni aparte klopodas igi la membrojn studi por ekzameno.

*Ekzamenoj.* Ordinara ekzameno okazis en Junio en Oslo. Unu kandidato plenumis la instruistan ekzamenon. La Ekzamena Komisiono konsistas el: C. Støp-Bowitz (prez.), Olav Rygg (sekr.), Eva Støp-Bowitz (kas.), Jens Schjerve kaj Elfrid Vormdal (membroj). Ekzistas 6 lokaj ekzamenaj komitatoj, nome en Bergen, Haugesund, Sauda, Tromsø, Trondhejmo, Østfold, kaj 6 ekzamenaj delegitoj ekster la komitatoj.





INFORMADO

*Informa Fako* (Komisiito pri informado: Ludvig Anjer). La komisiito i. a. per 2 cirkuleroj klopodis instigi la klubojn al varba aktiveco. Li aktive partoprenis la aktualajn kunsidojn en Madrido.

*La Propaganda Fondaĵo* ricevis donacojn de entute kr. 82,65. Cetere oni transigis al la fondaĵo la restintan sumon en la loteria konto, kr. 3082,65. Bankinterezoj estis kr. 386,52. El la fondaĵo oni uzis kr. 584,60. La fondaĵo posedis je la jarfino kr. 12 719,70.

*«Esperanto-nytt».* Ĉar la komisiito pri informado pro eksterordinara profesia okupiteco ne havis okazon fari decidajn paŝojn por ĝia reaperigo, tiu informbulteno ankaŭ dum 1968 ne reaperis.

*Informbroŝuroj.* Eliris preskaŭ la tuta reststoko (9000 ekz.) de «Det internasjonale språket — Esperanto», kaj la estraro decidis denove presigi ĝin kiel aldonon al Norvega Esperantisto kaj fari represaĵon de ĝi en nombro de 10 000 ekzempleroj. — La faldfolio «Velkommen til Esperantobevegelsen» estis disdonata al ĉiuj kursanoj por montri al ili la avantaĝojn de membreco.

*Gazetara Servo,* gvidata de Ludvig Anjer, elsendis al ĉiuj norvegaj ĵurnaloj 6 bultenojn kun sume 14 novaĵoj pri Esperanto, parte pere de lokaj reprezentantoj; 4 el la bultenoj aperis en ambaŭ oficialaj lingvoformoj. Oni daŭre abonis eltondaĵojn per la firmao «Argus». Oni registris 106 aperigojn de novaĵoj elsenditaj de la Gazetara Servo kaj 205 novaĵojn kaj artikolojn el aliaj fontoj. Entute oni do registris 311 aperigojn (480 en 1967) en 84 gazetoj kaj revuoj (99 en 1967). La malkreskon en la ciferoj ĉefe kaŭzis la fakto ke la gazetara servo de U.E.A. ne funkciis de Julio ĝis Decembro. Atakoj al Esperanto ne okazis. Pluraj kluboj aperigis raportojn pri tiaj kunvenoj kaj aliaj okazaĵoj en lokaj gazetoj. Konsiderinda nombro da ensenditaj artikoloj bone argumentadis por la Internacia Lingvo.

*Radio* (Komisiito: R. Bugge-Paulsen). Raportiĝis 6 mallongaj programeroj pri Esperanto, 5 lokaj (Vigra, Bergen, Stavanger) kaj regna ripeto de unu el ili. Raportiĝis neniu programero en televido. Propono pri rondtabla konferenco pri Esperanto en radio aŭ televido estis rifuzata. La kunveno de Okcidenta Distrikto en Hogganvik sendis rezolucion pri kurso de Esperanto. La Esperantaj radioprogramoj aperis dufoje en «Programbladet».

*Interŝtataj organizaĵoj* (Komisiito: R. Bugge-Paulsen). Ankaŭ la 15a UNESKO-konferenco en Parizo aŭtune 1968 ne pritraktis la skandinavian proponon rezultintan el la «Parlamenta Kampanjo». La Eŭropa lingvo-kampanjo stagnas post la morto de d.ro Herrmann. La komisiito denove kolektis proponantojn pri U.E.A. kiel kandidato por la Nobel-premio 1969.

*Blinduloj.* La komisiito, Otto Prytz, daŭre funkciis kiel sekre-

tario de la Esperanto-konsilantaro de «Norges Blindeforbund», kiu iniciatis premian konkurson pri lernado de Esperanto inter blinduloj; 5 personoj plenumis kurson kaj apartan ekzamenon kaj premie partoprenis la ferian semajnon en Helsingør; anonciĝis daŭriga koresponda kurso. Kluba Bulteno de Klubo Esperantista en Oslo estas surbendigata por blindaj membroj, kaj oni klopodas trovi aranĝon por surbendigado ankaŭ de Norvega Esperantisto.

*Skoltoj.* La komisiito, Hans Amund Rosbach, daŭre tenas kontakton kun interesiĝantoj. Li ankaŭ klopodis atentigi norvegajn vizitontojn al la tendaro en Essex, ke Esperanto tie estos oficiala lingvo.

*Junularo.* Ankaŭ dum 1968 ne funkciis komisiito. Oni daŭre serĉas novan komisiiton.

*Faksekcio por Instruistoj* estis gvidata de Astrid Mansrud.

*Esperanto en la lernejojn* (prez. de la Komisiono por Lerneja Kampanjo: C. Støp-Bowitz). Oni daŭre atendas iniciatojn de norvegaj instruistoj kaj lektoroj esperantistaj pri akiro de permeso por eksperimenta instruado de Esperanto en siaj lernejoj. Ŝajnas ke «Norges Gymnasiastsamband» ne atentis la rezolucion de la gimnazia societo en Kristiansund N. pri akcepto de Esperanto kiel elektebla lingvo en la nova gimnazio. Aliflanke la Lerneja Kampanjo, laŭ iniciato de Elna Matland, sendis al «Normalplanutvalget av 1967» rezolucion kun subskriboj de 52 instruistoj petante mencion de Esperanto inter la temoj proponataj por libere disponeblaj lecionoj de la lernejestraroj.

*Informaj prelegoj.* Raportiĝis 10 informaj prelegoj en Bergen, Flisa, Kongsvinger, Kristiansund N., Oslo, Rognan, Sand, Sarpsborg, kun sume proks. 300 aŭskultintoj.

*Ekspozicioj.* Raportiĝis 2 fenestraj ekspozicioj en Oslo.

*Nordlanda Esperanto-Komitato* (reprezentanto de N.E.L.: C. Støp-Bowitz). La komitato daŭre ne montris aktivecon.

## DIVERSAĴOJ

*Norvega Esperantisto.* La redakcia komitato konsistis el Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg (ĉefredaktoro) kaj Hans Amund Rosbach, Kristiansund N. (ekde n.ro 9/10 provizore transprenis kiel ĉefredaktoro), redaktoro de «Norvega Kroniko» estis Karsten Langsholt, Sarpsborg. La gazeto estis redaktata ĉefe laŭ la samaj principoj kiel en 1967. Oni disponigis paĝon en ĉiu numero al N.E.F.A., kaj la «Fervojista paĝo», sub redakto de Odd Kolbreg, estis ŝatata legaĵo ankaŭ de nefervojistoj. — Ekde n.ro 4 «Østlendingen» ne plu povis prizorgi kompostadon kaj presadon, kaj havigis al ni alian presejon, A. Sæther, Hamar, kiu tamen estas konsiderinde pli multekosta, kaj multe malfruiĝas. La ekspedadon prizorgis Kjell Gustavsen. — Aperis 6 ordinaraj numeroj 16-paĝaj kaj 2 duoblaj numeroj 16-paĝaj, sume 128 paĝoj. La enspezoj ne permesis eldonon de 10 plenaj 16-paĝaj numeroj.

*«Pro Merito».* Ordena promocio ne okazis dum 1968.

*Biblioteko.* La pruntedoneblaj libroj daŭre staras en la oficejo de N.E.L., la ceteraj estas sekure magazenitaj. La kresko de la biblioteko ĉefe rezultis el recenzekzempleroj, kiujn ricevis Norvega Esperantisto, kaj gazetoj ricevataj interŝanĝe kun ĝi. Pruntedoniĝis nur 3 libroj.

*«Reisetrafikkforeningen for Oslo og Omegn».* La kunlaboro kun tiu asocio fariĝas ĉiam pli ampleksa. Pluraj kopioj de ĝia filmo «Bonvenon al Oslo» kaj de la diapozitivoj kun akompana prelega teksto daŭre cirkuladas en la mondo. Klubo Esperantista en Oslo daŭre distribuadis la turistbroŝuron al petintoj en multaj landoj. En 1968 la asocio pretigis (en 3 kopioj) duan filmon, «Oslo, la vikinga ĉefurbo» de Ivo Caprino, kun Esperanta parolo.

*Turisma Servo de N.E.L.,* sub gvidado de Kirsten Ek, peris informojn kaj aliĝojn por la norvegaj anoj de la kongreso en Madrido. Oni kunlaboris kun la dana kaj sveda landaj asocioj pri skandinavia flugkaravano. — Aŭtune la Turisma Servo dissendis informojn pri la 54a Universala Kongreso en Helsinki.

*Internacia organizo.* La kunlaboro kun U.E.A. estis kontentiga. Ĉefdelegito por Norvegujo estas Alfred Skyberg, Komitatano A de N.E.L. estas Ludvig Anjer. C. Støp-Bowitz estas Komitatano B. Anjer partoprenis la Komitatkunsidojn dum la kongreso en Madrido. En 1968 estis 59 Delegitoj en 21 lokoj en Norvegujo. La nombro de Individuaj Membroj de U.E.A. estis 93. En la konkurso de U.E.A. Norvegujo daŭre estas lokigita en la dua grupo (landoj kun malforta movado), kie ni atingis la 8an lokon, kun 80,07 %.

*53a Universala Kongreso de Esperanto* okazis en Madrido. Aliĝis 20 norvegoj, el kiuj 17 ĉeestis. La Norvegan Registaron reprezentis Elna Matland, reprezentanto de N.E.L. estis John Berggreen. — Oni transsendis aŭtune la 1-an kongresan rezolucion al la Registaro, kiu respondis pozitive, kaj la 2an al la turistaj organizaĵoj.

*Prelegvojaĝoj.* Aŭtune oni aranĝis prelegvojaĝon por la hindo Abani Halder al Orienta, Okcidenta kaj Norda Norvegujo.

*Helpagado.* Oni daŭrigas la kunlaboron kun Mocambiko kaj kun Esperantista Asocio de Madagaskaro.

*«Vivo de Zamenhof».* La transprenita stoko de la norvega eldono de Privat: «Vivo de Zamenhof» estas disvendata por kr. 3,00, sed la disvendado ne okazas kontentige vigle.

*Jaro de Homaj Rajtoj.* La plena teksto de la Deklaracio pri Homaj Rajtoj aperis en Norvega Esperantisto n.ro 2. N.E.L. estis akceptata kiel membro de «Den Norske Komité for det Internasjonale År for Menneskerettighetene 1968», kiel nia reprezentanto funkciis C. Støp-Bowitz kun John

Berggreen kiel anstataŭanto. Ambaŭ partoprenis en la du kunsidoj, kiujn havis la komitato post nia membrio. C. Støp-Bowitz verkis artikolon «Menneskerettigheter og Sprogdiskriminering» (kiu aperis kiel kroniko en «Arbeiderbladet» 24. Januaro 1969). En la raportoj de la komitato aperis detalaj informoj pri la kontribuoj de N.E.L..

*Semajno de Amikeco.* La estraro decidis ke N.E.L. partoprenu en la «Semajno de Amikeco» proponita de U.E.A. por Februaro 1969.

*Kartoteko pri norvegaj esperantistoj.* La kartoteko enhavas nun 10 045 slipojn pri esperantistoj en 782 lokoj.

*Korespondа statistiko.* N.E.L. kun ĉiuj sekcioj dum la jaro ricevis 1292 leterojn kaj 1131 presaĵojn kaj sendis 1162 leterojn kaj 2385 presaĵojn.

*La intereso pri Esperanto* evidente ekzistas latente, sed necesas veki ĝin. Regule la oficejo ricevas kaj respondas informpetojn pri Esperanto. — Per la malapero de «Esperanto-nytt» ni perdis nian eble plej bonan aktivigilon. La Liga Estraro decidis reaperigi ĝin, sed la Informa Fako ankoraŭ ne efektivigis la decidon. — Nia «sistema varbado» estas regule aplikata al ĉiuj interesiĝantoj, kio rezultigas regulan alfluon de precipe rektaj membroj. — Parto de la gazetaro kontentige publikigadis pri Esperanto.

*Konkludo.* Ankaŭ 1968 montras malkreskon de la membronombro, kiu jam estas danĝere malalta, kaj konsistas nun ĉefe el maljuniĝantaj fideluloj. Estas *urĝe necese* renovigi la membraron, antaŭ ĉie per junaj fortoj. Konsiderante la laborplanon de N.E.L. ĉiu klubo kaj ĉiu membro *devas* streĉi ĉiujn fortojn por denove kreskigi la membronombron.

Oslo, la 31an de Decembro 1968 / la 26an de Februaro 1969

*C. Støp-Bowitz* — *Kjell Gustavsen*
*John Berggreen* — *Signe Korstvedt*
*Karl Ekhaugen*
*Olav Rygg* — *Kirsten Ek*

Se vi havas intereson pri la naturo, speciale pri birdoj, fariĝu membro de ORNITOLOGIA RONDO ESPERANTLINGVA, kies revuo «La Mevo» entuziasmigos vin. Jarkotizo: 7 n.kr. Landa deligito: Lars Kåre Hunnes, Reidulvs gt. 15, 7000 *Trondheim,* poŝtgirkonto 8 77 62.





# *Jarkalkulo de Norvega Esperantista Lido*

## Spezoj 1968

| | | |
|---|---|---|
| *Enspezoj:* | | |
| Klubkotizoj | | 4 905,00 |
| Rektaj membroj | | 2 470,00 |
| Norvega Esperantisto, rektaj abonoj anoncoj | | 1 507,84 |
| Rentumoj | | 280,97 |
| Donacoj, lukontribuo | | 2 027,10 |
| El la kontorfondaĵo | | 687,90 |
| El la kapitalo: manko | | 1 709,44 |
| *Elspezoj:* | | |
| Kostoj | 1 472,90 | |
| Amortizo | 210,00 | |
| Norvega Esperantisto | 7 102,75 | |
| Luado | 2 715,00 | |
| Afranko | 1 079,60 | |
| Gazetara Servo | 396,00 | |
| Kotizoj al U.E.A. | 434,00 | |
| Kotizoj al la Distriktoj | 178,00 | |
| | 13 588,25 | 13 588,25 |

BILANCO JE 31/12 1968

| | | |
|---|---|---|
| *Aktivaĵoj:* | | |
| En la kaso | | 64,16 |
| Poŝtĝirokonto 100.30 | | 2 566,10 |
| Meblaro | 2 132,88 | |
| ÷ amtortizo | 210,00 | 1 922,88 |
| «Pro Merito» | | 286,09 |
| 243 akcioj en Esperantoforlaget A.s | | 5 346,00 |
| Debitoroj: | | |
| Prop. Fond. en Oslo Sparebank | 12 135,10 | |
| Andresens Bank | 8 162,59 | |
| Div. debitoroj | 1 149,13 | 21 446,82 |

*Pasivaĵoj:*

| | | | |
|---|---|---|---|
| Div. kreditoroj | | | 4 952,23 |
| La kontorfondaĵo | 3 803,63 | | |
| + donacoj | 1 427,10 | | |
| | 5 230,73 | | |
| ÷ lupago | 2 115,00 | | 3 115,73 |
| «Esperanto-nytt» | | | 3 465,76 |
| La Propaganda Fondaĵo | 9 167,88 | | |
| + «Lotteriet» | 3 082,65 | | |
| + donacoj 1968 | 22,65 | | |
| + rentumoj | 386,52 | | |
| | 12 659,70 | | |
| ÷ elspezoj | 524,60 | | 12 135,10 |
| Garantifondaĵo dumvivaj membroj | | | 617,00 |
| Konservataj klubkasoj | | | 825,02 |
| Kapitalo | 8 230,65 | | |
| ÷ manko | 1 709,44 | | 6 521,21 |
| | | 31 632,05 | 31 632,05 |

Oslo, la 31an de Decebro 1968 / la 26an de Februaro 1969

*Karin Sandberg. John Selbekk*
revizoroj

*Karl Ekhaugen*
kasisto

# La Korespondaj Kursoj

(Avdeling for Brevundervisning)
SPEZOJ 1968

*Enspezoj:*

| | | | |
|---|---|---|---|
| Kurskotizoj | | 582,90 | |
| Rentumoj | | 181,74 | |
| El la kapitalo | | 36,06 | |





*Elspezoj:*

| | | | |
|---|---|---|---|
| Studmaterialoj uzitaj | | 350,00 | |
| Kostoj | | 354,80 | |
| Afranko | | 95,90 | |
| | | 800,70 | 800,70 |

BILANCO JE 31/12 1968

| | | | |
|---|---|---|---|
| *Aktivaĵoj:* | | | |
| En la kaso | | 16,74 | |
| Poŝtĝirokonto 100.33 | | 1 242,36 | |
| En la Poŝta Ŝparkaso | | 2 201,54 | |
| Forretningsbanken | | 3 731,68 | |
| Studmaterialo | | 3 250,00 | |
| *Pasivaĵoj:* | | | |
| Kapitalkonto | 10 478,38 | | |
| ÷ manko | 36,06 | | 10 442,32 |
| | | 10 442,32 | 10 442,32 |

Taps- og vinningskonto er satt opp etter kassa-dagbok med bilag, som er revidert. Postgirokonto og bankbøker stemmer med ovenstående tall i status.

La 7an de Marto 1969.

*Else-Margrethe Müller*
kasistino

*Erling Anker Haugen*
revizoro

# Korespondu!

50-jara nova esperantistino, oficistino, militvidvino, deziras korespondi. S.ino Stojanka Subotiĉ, I. St. Peŝĉenica 61, *Zagreb*, Jugoslavujo.

20-jara ĉeĥa studento kun granda intereso pri Skandinavio deziras korespondi kun samaĝaj norvegaj gejunuloj pri ĉiu temo. Ladislav Kovár, U. Kostelicka 519/13, Ceska Trebova, Ĉeĥoslovakujo.

Esperantista familio (patro kaj 2 filinoj) deziras korespondi kun norvegaj gesamideanoj. Oldrich Heĉ (46-jara meĥanikisto), Milena Heĉova (17-jara), Alena Heĉova (12-jara), ĉiuj: Pardubice-Dukla 2163, Ĉeĥoslovakujo.

Mi deziras korespondi kun fraŭlino el Oslo aŭ el alia granda urbo. Interesiĝas pri vojaĝoj, filozofio, moroj, poŝtmarkoj k.t.p.. André Beder, 19 rue Brochant, *Paris (17)*, Francujo.

19-jara pola esperantistino tre volus korespondi kun geesperantistoj de via lando. Grazyna Kmieĉ, ul. Miandowskiego 5, *Wroclav IX*, Polujo.

## Sciigoj de N.E.L.

*La kontorfondaĵo.* La nuna oficejo estas gravega helpo por nia laboro, sed sen ekonomia subteno flanke de la membroj ni ne povas tenadi ĝin. Dankante al ĉiuj malavaraj helpantoj ni apelacias al ĉiuj, kiuj havas okazon, sendi doncojn, aŭ malgrandajn, ĉu grandajn. Tiel vi helpos firmigi la laboron por Esperanto en Norvegujo.

*La Propaganda Fondaĵo.* Samtempe ni memorigas ankaŭ pri la tre grava Propaganda Fondaĵo. Jam plurfoje ĝi ebligis al ni plenumi gravajn aferojn, sed por ke tio povu daŭri, la fondaĵo bezonas pliajn enspezojn. Estas evidente ke ju pli granda fariĝos la fondaĵo, des pli utila ĝi estos.

*«Vivo de Zamenhof».* Kiel oni scias, N.E.L. transprenis la restokon de la norveglingva eldono de la fama verko de Edmond Privat, kaj ni vendas ĝin por la treege malalta prezo de kr. 3,00. Ĉar la librostoko ligas grandan parton de la malgranda kapitalo de N.E.L., estas grave forvendi la libroj laŭeble rapide, kaj ni rekomendas al la membroj amase aĉeti ĝin. Ĝi aparte taŭgas kiel donaco al homoj, kiujn vi deziras varbi por nia movado.

*Nova filmo.* La Turisttrafika Asocio de Oslo kaj Ĉirkaŭaĵo pretigis Esperante parolantan eldonon ankaŭ de la filmo de Ivo Caprino: «Oslo, la vikinga ĉefurbo». Temas pri 16 mm. filmo en koloroj. Norvegaj kluboj povos pruntepreni de N.E.L. kopion antaŭ la somero. Aŭtune ĝi komencos cirkuladon eksterlande.

*Taskotabelo por kluboj. — Majo:* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La estraro diskutas la aŭtunan laboron kaj starigas planojn pri kursoj kaj aliaj aktivecoj.

*Raporto de la Liga Estraro pri la 1-a jarkvarono.* Okazis 2 estrarkunvenoj. Oni dissendis 2 cirkulerojn al la kluboj, 1 ankaŭ al la rektaj membroj. La norvega traduko de Dok. C.E.D./7 estas multobligita. Oni admonis al ĉiuj membroj partopreni en la «Semajno de Amikeco» aranĝita de U.E.A.. Oni reelektis Ludvig Anjer Komitatano A de U.E.A.. Oni denove presigis la broŝuron «Det internasjonale språket — Esperanto» en Norvega Esperantisto kaj faris represaĵon en nombro de 10 000. La preparoj por la 41a Norvega Esperanto-Kongreso en Løten, kaj la reviziado de la koresponda kurso progresas.

*La Liga Estraro.*





# FERVOJISTA PAĜO

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA FERVOJISTA ASOCIO — NEFA

Redaktoro: Odd Kolbrek, Kaldbakkstubben 22, Oslo 9

## Patrofrato Anton rakontas

*De Magnus Carlsen*

Anton estis frato de mia avo. Sed, ĉar mia patro ĉiam nomis lin patrofrato kaj neniam onklo, ankaŭ ni infanoj nomis lin patrofrato.

Anton naskiĝis en la jaro 1840 kaj mortis en la jaro 1932 atinginta la altan aĝon de 92 jaroj.

Dum siaj lastaj vivadjaroj li, kiel aliaj, iom post iom malfortiĝis fizike, kaj plejparte de la tempo li tial ripozis en sia lito. Sed lia cerbo estis mirinde klara. Li memoris multajn okazaĵojn de sia juneco. Estis ĉiam tre interes aŭskulti kion li havis por rakonti.

Iam en la 1920-jaroj tiam mi vizitis lin, mi demandis lin ĉu li memoras ion de la unua fervojo de nia lando, la populare nomata ĈEFFERVOJO, kiu situas inter Oslo (tiam Christiania) kaj Eidsvoll? Ĝi estis inaŭgurata por trafiko la *1an* de septembro 1854 kaj havis longon de 60 kilometroj.

Anton, kiu mem ne estis fervojisto sed lignaĵisto, respondis al mia demando per jena rakonto:

«Jes, mi bone memoras la unuan tempon de la ĈEFFERVOJO, ĉar mi jam estis 14-jarulo kiam la trafiko sur ĝi komencis. Mi memoras ke la vagonoj de la plej malmultekosta prezklaso estis sentegmentaj, tiel ke la pasaĝeroj ne estis ŝirmataj nek kontraŭ la ĉiela pluvo aŭ la fajrerpluvo de la lokomotivo.- precipe dum «griza» kaj «peza» vetero estis la vojaĝo malpli agrabla pro la malleviĝinta fumo de la lokomotivo. Venintaj al Christiania (nun Oslo) la pasaĝeroj tiam similis al negroj en siaj vizaĝoj. Pro tio mi scias ke troviĝis pluraj kiuj preferis iri laŭvoje al la ĉefurbo. En la nomitaj vagonoj ankaŭ ne troviĝis sidbenkoj. Tial, se oni deziris sidi dum la vojaĝo, oni devis kunporti keston, kiu utilis kiel sidbenko.

Sed iom post iom la vagonoj pliboniĝis, kaj laŭ pasado de kelkaj jaroj kutimiĝis, ke oni uzis la trajnon kiam oni deziris sin al la ĉefurbo.

De la unua tempo de la ĈEFFERVOJO mi plue memoras okazaĵon pri kiu mi volas rakonti: En la proksimeco de Lillestrøm troviĝis viadukto kiu estis konstruita de dikaj trunkoj. (— Skizo

de tiu viadukto troviĝas en la Fervojmuzeo en Hamar, — M. C. —). Iun tagon komencis bruli en unu el la trunkoj de la viadukto. Supoze estis fajrero de la lokomotivo kiu kaŭzis la ekbrulon. Sciante ke trajno jam estis deirinta de Christiania, oni kompreneble timiĝis. Feliĉe oni havis sufiĉe da tempo por haltigi kaj reteni la trajnon ĉe la najbara stacio Strømmen. Sukcesis ankaŭ estingi la fajron en la brulanta trunko. Sed post tiu okazaĵo oni komencis plenigi la valecan profundaĵon super kiu la viadukto estis konstruita.

Plue mi povas mencii, ke dum la pleniga laboro oni perdis du el la vagonoj, kiujn oni uzis por transporto de la pleniga materialo, kiu konsistis el amaso da ŝtono kaj argilo. De ia kaŭzo la vagonoj balanciĝis ekster la ŝpurfino kaj falis ĝis la fundon de la profundaĵo. Ĉar oni tiam ne havis je dispono taŭgan levilon por supren levi la vagonojn el de la fundo de la profundaĵo, oni destinis ke ili restu en la profundaĵo, kovritaj de amasego da plenigmaterialo — verŝajne por ĉiam», finis patrofrato Anton sian rakonton.

Ja, estis tre interesa distrado aŭskulti al patrofrato Anton tiam li rakontis ion de «malnovaj tagoj».

*

## BIBLIA KORESPONDA KURSO

«La Navigantoj» kaj diversaj aliaj evangeliaj eldonaĵoj estas senkoste havigeblaj ĉe Esp.-Misio, Sveda sekcio de KELI, Box 7, S-690 51 *Östansjö*, Svedujo.

Se vi havas antaŭmilitajn numerojn de NORVEGA ESPERANTISTO, bonvolu skribi al sro. Ramon *Molera* - Sta. Joaquina, 13 - *Moyá* (Barcelona) - Hispanujo.

NORSK ESPERANTO-FORBUND
*(Norvega Esperantista Ligo)*

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30-16.30

*Turisma Servo:* Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

ESPERANTOFORLAGET A/S
*(Eldonejo Esperanto A/S)*

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

*Ĉefdelegito de U.E.A.:*
S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo 6. Postgiro 133.29

*La redakcio:*
Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, N-1700 Sarpsborg. —
Uzu tiun adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj. — Telefono: 54 727

Trykk: A. Sæther A.s - Hamar